

Enhavo

- **anoncoj**

Esperanto-USA partoprenos konferencon de ACTFL;
Korespondi deziras; Invito al kuba kongreso

- **Esperanto-kurso en la urbo, kiu neniam dormas**

instruado

Tre nekutima Esperanto-kurso okazis ĉi-jare en Novjorko. 12 elstaraj studentoj de la universitato de la Urbo Novjorko (CUNY), sekvis 10-tagan rekt-metodan kurson pri Esperanto en Majo-Junio 2015.

- **La pentritaj preĝejoj de Teksaso**

vojaĝe tra Usono - Fred Meyer, III

La pentritaj preĝejoj de kampara Teksaso estas konservendaj, same kiel la misiejoj en San Antonio kaj aliaj pli malnovaj urboj de Teksaso. Ni, kaj teksasanoj kaj ekster-teksasanoj, vizitu ilin kaj helpu konservi ilin.

- **Filmfarado en la fokuso**

kino - Derek Roff

Kunlabore kun NASK kaj la Kino-Teatro-Festivalo (KTF), la 12-a programo pri Aktivula Maturigo (AMO) sukcese donis unuan, aŭ daŭrigan trejnadon pri kinoarto kaj filmfarado al pli ol kvardek partoprenantoj.

- **Mi trovis! – paroliga kartludo**


ludoj - Hoss Firooznia

Mi trovis! estas kartludo por inter du ĝis sep ludantoj. Kvankam ĝi estas malserioza ludo, kun fantaziaj bildoj kaj humoro foje infaneca, ĝi tamen instigas kreeman paroladon, kaj tiel bone taŭgas por malstreĉe ekzerci la lingvoscion.

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2015:4 (jul-aŭg)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2015:4 (jul-aug)



Ĉi-numere:

- *Instruado:* Esperanto-kurso en Novjorko
- kino: Filmfarado en fokuso ĉe NASK
- Kaj pli...

La pentritaj preĝejoj de Teksaso

Usona Esperantisto

Sendu kontribuojn al <bulteno ĉe esperanto-usa punkto org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

anoncoj

Esperanto-USA partoprenos konferencon de ACTFL

La ĉi-jara konferenco de ACTFL (*American Council on the Teaching of Foreign Languages*) okazos 20–22 Novembro, 2015 en Sandiego. Pli ol 6000 edukistoj venos por vidi prezentaĵojn pri modernaj rimedoj kaj metodoj instrui lingvojn.



Esperanto-USA ja partoprenos la konferencon. Ni mendis tablon, por ke ni povu reklami Esperanton kaj montri la rimedojn por instrui nian lingvon. Mar CARDENAS konsentis organizi teamon por deĵori ĉe la tablo dum la tuta konferenco.

La kosto de la tablo estos \$1,200. David WOLFF promesis, ke la fonduso Wolff egale parigos ĉiun donacon, do ankoraŭ \$600 estas bezonata.

Mi petas kontribuojn al ĉi tiu projekto. Ĉiu donaco estas bonvena. Sendu ĉekon aŭ pagu rete al via konto ĉe E-USA [<http://bit.ly/1VME3kT>].

Antaŭdankon!



The American Council of the Teaching of Foreign Languages (ACTFL) will hold its annual conference in November in San Diego, where more than 6000 educators will see modern materials and methods for language instruction. E-USA will have a table at the conference. The table will cost \$1200; the Wolff foundation will match all donations, so \$600 is still needed. Please contribute to this project. Send a check or pay online to your account at E-USA [<http://bit.ly/1VME3kT>].

— Bill HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo

Korespondi deziras

Mi estas sinjorino Pascaline Luhinzo M, en

Demokratia Respubliko Kongo (DRK). Mi ŝatus korespondi kun aliaj geesperantistoj. Mi ŝatas manmetiojn, turismon, religion, budhismon, Arduinon, kaj varti infanojn.

<luhinzoesperanto.bukavu@gmail.com>



Invito al kuba kongreso

(*Details in English below.*)

Oni invitis esperantistojn en Usono partopreni la Kuban Esperantan Kongreson en Havano ekde la 18-a ĝis la 22-a de Novembro.

Orlando RAOLA (prezidanto de E-USA) aranĝas, ke grupo vojaĝos laŭleĝe al Kubo por ĉeesti la Kuban kongreson.

Se vi havas intereson pri la grupo kaj deziras pli da detaloj, bv. kontakti la Centran Oficejon ĉe <eusa@esperanto-usa.punkto.org> kaj peti detalojn.

— Bill HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo



U.S. Esperantists have been invited to participate in the the Cuban Esperanto Congress, which will be held in Havana from the 18th to the 22nd of November.

Orlando Raola (president of E-USA) is organizing a group to travel legally to Cuba and attend the Cuban congress.


If you have any interest in joining the group and would like further details, please contact the Central Office at <eusa@esperanto-usa.punkto.org> and ask for details.

— Bill Harris, Director of the Central Office



Esperanto-kurso en la urbo, kiu neniam dormas

Tre nekutima Esperanto-kurso okazis ĉi-jare en Novjorko. 12 elstaraj studentoj de la universitato de la Urbo Novjorko (CUNY), Macaulay Honors College (kie studas la plej elstaraj 0.33% de la studentaro) sekvis 10-tagan rekt-metodan kurson pri Esperanto [<http://www.macaulayesperantofellows.com/>] en Majo-Junio 2015. La organizanto de la kurso estis Esther SCHOR: verkisto, poeto, profesoro ĉe la Universitato Princeton kaj ESF-konsilanto, kaj la instruisto estis Bill MAXEY.



[<https://youtu.be/FIrbYYgp4pM>]

Tiu ĉi iniciato havis tri ĉefajn celojn: trovi manieron interesi kelkajn el la plej elstaraj gejunuloj en Novjorko pri lingvaj aferoj ĉe la sidejo de UN, veki scivolemon pri Esperanto antaŭ la apero de la libro de Esther SCHOR: *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language* [<http://amazon.com/dp/0805090797>] (“Ponto de Vortoj: Esperanto kaj la Revo pri Universala Lingvo”), kaj, laste, kunigi kaj kunlaborigi plej elstarajn studentojn el la kolegio. La kurso mem celis pruvi ke Esperanto estas konkreta kaj utila lingvo, forviŝi negativajn supozojn pri la lingvo kaj ties adeptoj, konatigi la strukturajn elementojn kaj la flekseblecon de la lingvo, montri ke Esperanto havas siajn kulturon kaj komunumon, kaj stimuli

intereson pri plia studado kaj aliĝo al la komununo.

El 36 kandidatoj, la 12 plej taŭgaj studentoj estis elektitaj pro siaj akademias atingo, bonfara agado, interesoj (internaciaj studoj, homaj rajtoj, lingvistiko, lingvo, literaturo) kaj la ebleco fariĝi influaj en siaj fakoj. La elektitaj studentoj ricevis malgrandan stipendion de ESF, kun la promeso antaŭprepariĝi per Lernu.net kaj ĉeesti almenaŭ 9 el 10 lecionoj.

La kurso okazis nur pere de Esperanto. Ĝiaj ĉefaj temoj estis monda problemaro, la hejmurbo de la studentoj (Novjorko), kaj la vivspertoj kaj interesoj de la partoprenantoj. Inter la vizitantoj de la kurso estis la antaŭa UEA- kaj ESF-prezidanto, verkisto kaj profesoro Humphrey TONKIN, la mondkonata reĝisoro Sam GREEN (*The Universal Language* [<http://esperantodocumentary.com>] kaj la poeto kaj eldonisto Ulrich BECKER. La studentoj havis ankaŭ la okazon skajpi kun junaj esperantistoj tutmonde.

Ĉiuj partoprenintoj senescepte laŭdis Lernu!-on (“bonega”, “tre helpa”, “treege helpa”, “superhelpa”, “nekredeble helpa”, “fabela rimedaro”), kaj aparte aprezataj estis la vizitantoj, kiuj “donis al la kurso homan aspekton kaj pruvis ke E-o estas viva kaj tutgloba”, laŭ unu partoprenanto. Al la studentoj tre plaĉis la eblo aŭdi la lingvon, la poemoj, la malstreĉa kurs-strukturo, la atento al studentaj interesoj kaj opinioj, la diverseco de temoj kaj la tut-Esperanta etoso. “Mi laŭgrade enamiĝis kun ĝi kaj ankaŭ sentis emon apogi la Esperanto-movadon”, skribis unu el la finintaj studentoj.

La prezidanto de UEA kaj ESF-estrarano, Mark FETTES, prezentis tiun kurson dum la Tago de Lernado dum la UK en Lillo.

[*Dankon al ESF pro la raporto. —Red.*]

La pentritaj preĝejoj de Teksaso

Fred MEYER, III

En centra Teksaso troviĝas ĝis 35 bele pentritaj preĝejoj, kiujn konstruis germanaj kaj ĉeĥaj (bohemanj) enmigrintoj dum la 19-a kaj la frua 20-a jarcentoj. Kelkaj homoj nomas la preĝejojn “La Pentritaj Virinoj” pro tio, ke kelkaj estis nomitaj laŭ sanktulinoj. La eksterajoj de la preĝejoj estas diversaj: lignaj, ŝtonaj, kaj brikaĵoj. Sed la internaĵoj estas el pentrita ligno.

Kvankam ili situas ĉefe en la konteo Fayette, ses konteojn en Teksaso setlis mez-eŭropanoj. Do la preĝejoj estas trovitaj en kelkaj. En Fayette estas:

- *Saint Mary's* en High Hill
- *Saint John the Baptist* en Ammannsville
- *Saints Cyril and Methodius Church* en Dubina
- *Saint Mary's Church* en Praha

En aliaj konteoj estas la preĝejoj:

- *Saints Cyril and Methodius* en Shiner en la konteo Lavaca
- *Wesley Brethern* en Dubina en la konteo Austin
- *Saint Mary's* en Fredericksburg en la konteo Gillispe
- *Saint Paul's* en Serbin en la konteo Lee

Estas ankaŭ aliaj pentritaj preĝejoj en Teksaso: ekzemple, la preĝejoj konstruitaj de polaj setlintoj.

Metodistoj estis gravaj inter la setlintoj; eĉ inter la germanoj kaj bohemoj. Unue la metodistoj havis rondvojaĝantajn pastorojn, kiuj iris de unu urbeto al alia por helpi kun la religia vivo de setlintoj. Poste ili ekkonstruis preĝejojn en tiuj urbetoj. Ekzemplo estas *United Methodist Church* en Freyburg en la konteo Fayette. Oni devas ankaŭ vidi la hispanajn misiejojn de Teksaso.

La pentritaj preĝejoj videblaj hodiaŭ plej ofte ne

estas la originalaj konstruaĵoj; oni kutime rekonstruis ilin unu- aŭ du-foje. Teksaso estis prospera kaj progresema regiono dum la malfrua 19-a jarcento kaj la frua 20-a jarcento. Do la terkulturistoj de Teksaso volis konstrui belajn kortumdomojn kaj preĝejojn.

Vi povas mem vojaĝi al la pentritaj preĝejoj. Plejparte ili estas malfermitaj al sen-anoncita vizitado. Oni devas antaŭaranĝi vidi kelkajn el ili. Vi povas ankaŭ trovi rondvojaĝojn. Mi interrete trovis multajn, kiuj komenciĝas en Schulenburg, Teksaso kaj vojaĝas tra aliaj urbetoj.

La kortumdomoj de Teksaso estas ankaŭ vizitindaj. Mi memoras, kiam mi portis grekan vizitanton al Denton kaj ni preterpasis la kontean kortumdomon. Li demandis al mi, kiu sekto konstruis tiun preĝejon, ĉu ortodoksa? Li tre surpriziĝis, kiam ni eniris kaj mi montris al li la kortumĉambrojn kaj klarigis, ke la domo ne nur estas la ĉefa juĝista domo sed ankaŭ la ĉefa administra domo de la kontea registaro. Ankaŭ la kortumdomoj de la konteo Parker kaj la konteo Fayette estas belaj kaj vidindaj.

Malgraŭ tio, ke la internoj de la pentritaj preĝejoj vere estas lignaj, ili ne aspektas tiel. *Saint Mary's* en High Hill ŝajnas havi marmorajn kolonojn. La pentrado estas tre bela kaj tre konvinka. Mi konas tiun preĝejon en High Hill. Kiel junulo mia avo helpis konstrui ĝin en 1906. Mi vizitis ĝin foje dum mia junaĝo. Vi povas imagi mian surprizon kiam, kiel dekkelkulo, mi unuafoje ekkomprenis, ke la kolonoj estas ne el marmoro, sed el pentrita ligno. Estas ankaŭ fierige vidi unuafoje familiajn nomojn en la vitraloj de la preĝejo. La altaroj, muroj kaj plafonoj en la katolikaj preĝejoj estas ellaborite pentritaj.

La pentritaj preĝejoj de kampara Teksaso estas konservendaj, same kiel la misiejoj en San Antonio kaj aliaj pli malnovaj urboj de Teksaso. Ni, kaj teksasanoj kaj ekster-teksasanoj, vizitu ilin kaj helpu konservi ilin.




La unua etaĝo de *Saint Paul's* en la konteo Lee



United Methodist Church en Freyburg en la konteo Fayette




Kortumdomo en la konteo Parker



Saint Mary's en High Hill



La kortumdomo en Denton, Teksaso



Fred MEYER III

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten.

Amikeco inter homoj kaj la disvolvo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

<f3meyer ĉe texoma punkto net>

Filmfarado en la fokuso

Derek ROFF

Kunlabore kun la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) kaj la Kino-Teatro-Festivalo (KTF), la 12-a programo pri Aktivula Maturigo (AMO) sukcese donis unuan, aŭ daŭrigan trejnadon pri kinoarto kaj filmfarado al pli ol kvardek partoprenantoj ĉe la universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. La programo okazis inter la 30-a de Junio kaj 9-a de Julio. Efektive, tio estis longigo de la planita seminario, pro la entuziasmo de la partoprenantoj, kaj la diligenta laboro cele al preparo de videofilmeto.

Ĉirkaŭ sesdek personoj partoprenis. Kune kun membroj de la loka publiko, ni komencis per prelego de la verkisto, reĝisoro, kaj film-faranto Christopher MIHM. Post eldonado de dek sendependaj, plenlongaj filmoj, kvin kun dialoga trako kaj subtitoloj en Esperanto, Christopher preparolis la defiojn kaj sukcesojn de lia aliro al filmfarado, kaj la avantaĝoj, kiujn li vidas pro la aldono de Esperanto al liaj filmoj. Ĉeestantoj ĉerpis multon el lia granda sperto en la metio. Li finis la vesperon per prezento de sia plej lasta filmo.



Reĝisoro Christopher MIHM prelegas ĉe la Kino-Teatro-Festivalo en Raleigh, Norda Karolino. (Foto de Makis DIRAS.)

La cetero de la semajno dividiĝis inter prelegoj kaj similaj instru-sesioj kaj praktika trejnado pri la teknikaj kaj rakontaj metodoj, kiuj subtenas la kreadon de sukcesa videofilmo. La originalan tekston de nia projekto verkis Tim WESTOVER, konata pro siaj romanoj kaj noveloj. Dum la kreado, ni notis la grandan kongruecon inter fikcia kaj ne-fikcia produkto, kaj la foje gravajn distingojn inter la du kampoj. La prelegoj traktis interalie la sekvajn temojn: antaŭplanado, teknikajn rimedojn kaj bezonojn, fotilojn kaj son-registritilojn, verkadon de scenaroj, tradukadon rilate al filmado, terminologion, kiel atingi la publikon, kaj redaktadon/muntadon. Riĉardo DELAMORE el Aŭstralio tre interese prezentis pri la interreta televida kanalo Esperanto-TV [<http://esperantotv.net>].



La teamo paŭzas dum filmado de unu sceno.

Kerna teamo de 15 homoj daŭre laboris pri la preparo de la filmeto, kun subteno de aliaj partoprenantoj, kiuj ĉeestis unu aŭ pliajn laborsesiojn. AMO-anoj povis sperti kaj spertiĝi en la uzo de la fotiloj/kameraoj, mikrofonoj, sonregistritiloj, kaj aliaj aparatoj. Ili lernis ion pri la planado kaj aranĝado de kamera-pozicioj, la elekto de lenso-longoj, elekto de fokuso, kolor-ekvilibro, la traktado de moviĝo de la aktoroj/subjektoj ene de la kadro, kun kaj sen dialogo, longoj de la scenaroj, ŝanĝoj en fotila pozicio de unu scenaro al la sekva,

mastrumado de natura lumo kaj elektra lumo, reĝisorado, kaj prinotado de ĉiuj okazaĵoj kaj ŝanĝoj. En la studio, ni ekzercis la registradon de sono, por posta kombino kun la filmo. Super ĉio, ni lernis kiom da tempo necesas por plani kaj filmi malmultajn minutojn de fina video.

La redaktado daŭros dum kelkaj semajnoj post la fino de la seminario, kaj anoj de malgranda grupo kunlaboros per Interreto de siaj diversaj hejmoj. Post la fina polurado, ĉiuj povos vidi la mallongan rezulton de tiu grandega laboro per la reto.

La lastan vesperon de la seminario, la grupo spektis kelkajn filmetojn de la antaŭaj KTF kaj NASK, kaj diskutis la fortojn kaj malfortojn de ĉiu ero. Oni prezentis plurajn scenojn el la nuna projekto, kaj la grupo petis spekti ilin plurfoje. Fine, ni parolis pri planoj kaj ebloj por estontaj kunlaboroj kaj projektoj. Multaj partoprenantoj esprimis feliĉon pri la sperto kaj lernado, kiujn ili akiris dum la seminario. Oni voĉis entuziasmon pri la venonta jaro, kaj apliko de la novaj scioj al la bezonoj kaj deziroj de la partoprenantoj kaj de la movado.

Mi trovis! – paroliga kartludo

Hoss FIROOZNIĀ

Tradiciaj vortludoj kiel *Skrablo* kaj *Vorto-Mozaiko* povas esti vere atentokaptaj distraĵoj. Foje eĉ tro atentokaptaj. Plej ofte ili konvenas al medita, trankvila etoso (pensu pri kafejo, ekzemple), kie ludantoj povas silente cerbumi pri la intelekta defio.

Foje tamen oni serĉas ludon pli konvenan al festa, ridoplena etoso (pensu ĉi-foje pri trinkejo). Tiukaze, oni eble konsideru la ĉi-numeran ludon.

Pictureka! estas anglalingva kartludo por inter du ĝis sep ludantoj. Kvankam ĝi estas malserioza afero kun fantaziaj bildoj kaj infaneca humoro, ĝi instigas kreeman paroladon, kaj tiel ĝi bone taŭgas por malstreĉe ekzerci la lingvoscion. La anglalingva nomo estas kunmetaĵo de *Picture* kun *Eureka*, grekdevena krio por anonci ektrovon. En Esperanto do mi nomas la ludon *Mi trovis!*

La tuta ekipaĵo konsistas el du kartaroj. La pli granda (kun 78 kartoj) havas nur senvortajn bildojn. Inter ili oni renkontas aferojn jen banalajn (futbal-ludanton), jen bizarajn (marmonstron en aŭtobuso), jen apenaŭ priskribeblajn (lumturon kiu fandiĝis kun album-ludilo), sed ĉiam amuzajn.



La dua kartaro (kun 32 kartoj) enhavas mallongajn priskribojn, po du sur karto. (Ekzemple: “io malbonodora; io kun pli ol kvar kruroj”). Do la anglalingva enhavo estas sufiĉe malgranda – nur 64 mallongaj frazoj por enesperantigi. Tion mi jam faris; fine de la artikolo vi trovos ligilon al presebla PDF-dosiero, kiu enhavas Esperanto-versiojn de la originalaj kartoj.

La kreintoj de *Pictureka!* proponis kvar ludojn; en ĉiuj, ludantoj devas serĉi bildojn kiuj akordas kun unu el la priskribo-kartoj. Kiam mi ludas kun lernantoj, mi instigas ilin anonci sukceson ne nur per la postulita krio (“Mi trovis!”), sed ankaŭ per klarigo: **Kiel** la trovita bildo akordas kun la priskribo? Foje rezultas amuza konversacio aŭ eĉ disputo:

“Huhu... MI TROVIS! Vidu: jen priskribo ‘io trinkebla’, kaj jen bildo: anaso flosanta en bankuvo!”

“Nu, kiu trinkas anasojn?”

“Ne la anason, stultulo – la AKVON!”

“Jes, bone... sed ĉu oni vere trinkas akvon el bankuvo? Bleĥ!”

“Tute ne gravas, ĉu ĝi plaĉus al vi. La priskribo estas ne ‘io trinkINDa’, sed ‘io trinkeBLa’...”

Sekvas reguloj por tri el la kvar proponitaj ludoj; ili estas sufiĉe flekseblaj, kaj oni povas facile agordi laŭbezone. Rimarku, ke en ĉiuj ludoj la “pingvenokarto” estas ĵokero aŭ “ajnkarto” – ĝi akordas kun ajna priskribo.

Ludo 1: *Forigu okopon* (rapida, malfacila)

Celo: Forigi ĉiujn viajn ok bildkartojn. Oni forigas karton trovinte sur ĝi bildon, kiu akordas kun priskribo.

Antaŭ ol komenci: Miksu la priskribajn kartojn

kaj lasu ilin en stako (kun priskriboj kaŝitaj) meze de la tablo. Miksu la bildkartojn kaj disdonu ok al ĉiu ludanto. Ludantoj demetu siajn kartojn en kvar stakojn de po du kartoj, kun bildoj videblaj.

Kiel ludi:

1. Unu ludanto renversu priskriban karton de la stako, laŭtlege ambaŭ priskribojn, kaj lasu ĝin meze de la tablo (apud la stako) kun ĝia priskribo videbla.
2. Ĉiu rigardu siajn kvar suprajn kartojn. Serĉu bildon, kiu akordas kun unu priskribo aŭ la alia.
3. Se oni trovas akordan bildon, oni tuj frapu la koncernan bildkarton sur la priskriban karton kaj kriu “MI TROVIS!” Necesas klare priskribi, ĝuste **kio** en la bildo akordas. Se la aliaj ludantoj konsentas, la akordo estas valida. Se ili ne konsentas, reprenu la bildkarton kaj daŭrigu la serĉadon.
4. Tiu, kiu ĵus forigis bildkarton nun malkaŝas alian priskribkarton (iru al paŝo n-ro 1) kaj la ludo daŭras.

Kiel gajni: Gajnas la unua, kiu sukcesas forigi ĉiujn el siaj ok bildkartoj.

Ludo 2: Kreema kombino (malrapida, facila)

Celo: Estu la unua, kiu kolektas kvar priskribajn kartojn.

Antaŭ ol komenci: Miksu kaj disdonu al ĉiu ludanto tri bildkartojn kaj unu priskriban karton, kun bildoj/priskriboj kaŝitaj. Metu la restantajn stakojn de bild- kaj priskrib-kartoj meze de la tablo, ankaŭ kun bildoj/priskriboj kaŝitaj. La plej aĝa ludanto prenu du kartojn el la bildkarta stako kaj komencu la ludon.

Kiel ludi:

1. Kiam vico venas al ludanto, tiu rigardu siajn kartojn. Ĉu iuj tri bildkartoj akordas kun unu el la priskriboj? Se jes, saltu al paŝo n-ro 3. Se ne...

2. Forigu unu bildkarton (metu ĝin sur stakon de forigitaj kartoj) kaj prenu novan bildkarton. Kontrolu la kartojn denove. Ĉu tri bildkartoj akordas kun unu el la priskriboj? Se jes, iru al paŝo n-ro 3. Se ne: donu du bildkartojn (kun bildoj kaŝitaj) al la ludanto maldekstre; la vico nun iras al tiu. (Reiru al paŝo n-ro 1.)
3. Laŭte krii “MI TROVIS!”, montrante la priskribon kaj la tri akordajn bildkartojn. Precize klarigu la akordon.
4. Se la aliaj ludantoj ne konsentas pri la klarigo, reprenu la tri bildkartojn kaj donu du al la ludanto maldekstre; la vico nun iras al tiu. (Reiru al paŝo n-ro 1.)
5. Se ĉiuj konsentas, retenu la priskriban karton (sed flankenmetu ĝin) kaj forigu la tri bildkartojn. Prenu tri novajn bildkartojn kaj unu novan priskriban karton. Donu du bildkartojn al la ludanto maldekstre; la vico nun iras al tiu. (Reiru al paŝo n-ro 1.)

Kiel gajni: Gajnas la unua, kiu kolektas kvar priskribajn kartojn.

Ludo 3: Alfabeto serĉo (rapida, malfacila)

Celo: Rapide trovu en bildoj objektojn, kies nomoj komenciĝas per celita litero.

Antaŭ ol komenci: Formetu la priskribajn kartojn. La plej aĝa ludanto miksu la bildkartojn, elektu kaj anoncu komenc- kaj fin-literojn (ekz. “A ĝis L”), kaj komencu la ludon.

Kiel ludi:

1. Kiam vico venas al ludanto, tiu tenu la stakon de bildkartoj en la mano kun bildoj kaŝitaj. Laŭte diru la sekvan literon en la elektita sinsekvo (ekz. “A”) kaj komencu meti la bildkartojn surtable, unu post alia, kun bildoj videblaj. Ne iru tro rapide: demetu eble po unu karto en tri sekundoj. Metu ilin en vico de kvar kartoj, de maldekstre dekstren, kaj tiam metu la sekvajn kvar kartojn sur la unuajn kvar, kaj tiel plu.

2. Ĉiuj aliaj ludantoj serĉu objektojn kies nomoj komenciĝas per la celita litero (ekzemple “A”).
3. Trovinte akordon, oni laŭte kriu “MI TROVIS!”
La trovinto priskribu la trovitan objekton.
(Ekzemple: “Jen aglo, kies nomo komenciĝas per ‘A!’”) Se la aliaj ludantoj konsentas, ke tiu objekto vere troviĝas en unu el la videblaj bildkartoj, la trovinto ricevu la koncernan karton. La stako de ankoraŭ kaŝitaj bildkartoj nun iras al la maldekstra ludanto, kaj la ludo daŭras per sekva litero, ekzemple “B”. (Iru al paŝo n-ro 1.)
4. La ludo finiĝas kiam oni trovas bildon kiu akordas kun la lasta litero, aŭ kiam ĉiuj bildkartoj estas malkaŝitaj.

Kiel gajni: Gajnas la ludanto kiu havas plej multe da bildkartoj.

Rimedoĵ kaj ligiloj

Bonvolu rimarki, ke oni vendas plurajn versiojn de *Pictureka!*; unu versio havas ludobreton kaj ĵetkubojn, alia havas bildojn el *Disney*-rakontoj, alia temas pri Pasko, ktp. Ĉi tie mi traktas la plej simplan version, kiu havas nur du kartarojn. Ĝuste nun ĝi kostas nur \$7 ĉe Amazon [<http://amazon.com/dp/B0024D2C7K>].

Ĉe la retejo de *Usona Esperantisto* vi trovos ligilon al elŝutebla dosiero kun tradukaĵoj por la 32 priskribo-kartoj.



Hoss FIROOZNIA

Hoss estis komputilisto ĉe la Universitato de Roĉestro (Novjorkio), kie li studas tradukarton, foje instruas Esperanton, kaj redaktas tiun ĉi gazeton!

<hoss@lodestone.org>